



Pos-Amiko

IJK 2022, dimanĉo, numero 43

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

Nederlanda koncerto kaj nederlanda diskejo hodiaŭ!

“Mi ne venis al Nederlando por tiaj stultaĵoj, kie estas la nederlandaj fritiĵoj?”

– KKPS-veterano ĵus alveninta al la IJK.

Malaperis la partoprenantoj!

En la retpaĝo de la IJK legeblas 240 nomoj de homoj, kiuj aliĝis por veni al De Roerdomp. Sed rigardante ĉirkaŭen nun certe oni apenaŭ vidas homojn, certe ne ducent. Hieraŭ ŝajnis esti pli dum la interkona vespero, do kien ili malaperis?

Ĉu ili ĉiuj jam interkonatiĝis kun vivpartnero dum la interkona vespero, kaj nun kaŝiĝas en tendoj, ĉambroj aŭ arbustoj? Ĉu ili ĉiuj foriris per la bicikla ekskurso kaj ankoraŭ ne revenis? Aŭ ĉu amaso da homoj drinkis tro multe kaj ankoraŭ troviĝas sur siaj matracoj?

Por solvi la misteron mi iris ĵurnalismi en ĉiuj konstruaĵoj de la kongresejo. En la kuirejo kaŝiĝas kelkaj homoj por pretigi la sekvan manĝon, sed tio ne klarigas la amasan malaperon. En la organiza ĉambro kelkaj nederlandanoj komputilumas, sed ne pli. Kiuj aliaj spacoj estas?

Serĉante inter la agordoj de la reta programo mi trovis misteran butonon ‘montri nepublikajn programerojn’. Kaj jen! En Kunsidejo, Lernejo kaj Scenejo dum la tuta semajno sin kaŝas partoprenantoj, okupiĝante pri strangaj projektoj anstataŭ pli grava agado kiel naĝado aŭ esperantigo de vestaĵoj.

Do se vi renkontis ĉarmulon en la trinkejo, kaj ne plu trovas rin dum la tago, ne paniku. Via ĉarmulo verŝajne okupiĝas pri inkluziva demokratia muzikalo aŭ io tia.

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Ĉu la lago estas plena? Iru al Rivero!

Taŭro: Vi malkovras, ke pli bongustas fritita ol frotita manĝo.

Ĝemeloj: Atentu ekstere pri flugantaj frisbeoj kaj biciklaj komencantoj.

Kankro: Vi renkontos interesan fremdulon en la manĝejo, kiu provas vendi libron al vi.

Leono: Malkovru dum la bicikla ekskurso la unikaĵojn de Nederlando en superbazaro.

Virgulino: Post fermita sesio vi ne plu estos.

Pesilo: Vi festis tro longe hieraŭ kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Atentu, tiu ĉi IJK ne havas teleportilojn inter konstruaĵoj.

Karlos: Por atingi veran mensan liberecon, vi devas akcepti, ke eblas organizi IJK-n sen vi.

Sagitario: Komencu vian tagon bone, saluto Kokon Poso en la organiza ĉambro.

Kaprikorno: Ĉiu kuirejo havas kafmaŝinon. Neniu haltigas vin fari propran kafopaŭzon.

Akvisto: Aŭgusto estas bona monato por krei propran kulton, precipe en la IJK.

Fiŝoj: Se vi volas vidi vizaĝojn de homoj, iru for de konstruaĵoj kun sendrata reto.

Programo

	<u>Manjejo</u>	<u>Ekstere</u>	<u>Scenejo</u>	<u>Filmejo</u>	<u>For</u>
08:00	Matenmanĝo				
09:00	Novula programo	Tajĵi			Bicikla ekskurso
10:00	Slovena lingvo	Kurso por		Kulturo libera	naturo
11:00	Nederlanda lingvo	progresantoj		Muzaiko	
12:00	Tagmanĝo				
13:00					
14:00	Scienco pri E-o	Kurso biciklado			
15:00	Klimata mozaiko		Baĉato	Kinejo: Rivero	
16:00					
17:00	E-igu vestaĵojn!	Ultima frisbeo	AKSO-projekto		
18:00	Vespermanĝo				
19:00					
20:00			Wicked Problems		
21:00					
22:00	Trinkejo		Nederlanda diskejo		